


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Grafdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.

Jarabono:  
Nederlando: 0.80 guldeno  
Eksterlande: 11 fr.fr.; 0.70 dol;  
2.1 sv. fr.

Por progresintoj

## LA MATSUFAMA SPEGULO.

(Japana fabelo).

Antaŭ longa, longa tempo vivis en trankvila loko juna viro kun sia juna edzino. Ili havis unu infanon, filineton, kiun ili amis per sia tuta koro. Iliajn nomojn mi ne povas diri al vi, ĉar tiuj jam delonge forgesiĝis. Sed la loko, kie ili loĝis, estis Matsujama.

Iam okazis, kiam la filineto ankoraŭ estis malgranda, ke la patro por aferoj devis iri al la granda urbo, la ĉefurbo de Japanio. Estis tro granda distanco por la patrino kaj la malgranda infano, do li sola ekvojaĝis post kora adiaŭo. Li promesis kunporti por ambaŭ ion tre belan.

La patrino neniam forlasis sian naskiĝvilaĝon kaj ŝi iom timis, pripensante, ke ŝia edzo entreprenos tian longan vojaĝon; kaj samtempe ŝi ne malmulte fieris, ĉar li estis el tiu regiono la unua viro, kiu vojaĝis al la granda urbo, kie loĝas la reĝo kaj la grand-sinjoroj, kaj kie oni povas vidi tiom multajn kaj tiom belajn objektojn.

Fine alproksimiĝis la tago, en kiu ŝi povis atendi la revenon de sia edzo. Tial ŝi surmetis al sia filineto la plej belajn vestojn kaj al si mem la belan helbluan robon, kiun ŝia edzo plej volonte vidis. Vi povas imagi, kiom ĝojis la virino, kiam li ree estis hejme, sana kaj bonfarta, kaj kiel la malgranda knabino kunfrapis la manetojn kaj ridis, vidante la belajn ludilojn, kiujn la patro alportis por ŝi. Li sciis multon por rakonti pri la mirindaj aferoj, kiujn li vidis dum la vojaĝo kaj en la urbo.

„Por vi mi kunportis ion tre belan,” li diris al sia edzino. „Oni nomas ĝin spegulo. Rigardu, kaj diru al mi, kion vi vidas en ĝi.”

Kaj li donis al ŝi simplan blanklignan kesteton en kiu estis ronda, metala objekto. Unu flanko estis blanka kiel polurita arĝento kaj ornamita per birdo- kaj floriguroj, la alia flanko estis klara kiel la plej diafana kristalo. La juna patrino kun miro rigardis ĝin, ĉar el la fundo de l'metalo alridis ŝin afabla, feliĉa vizaĝo.

„Nu, edzinjo, kion vi vidas?” demandis la edzo denove. Li havis plezuron pro ŝia ekmiro, kaj ankaŭ ĉar li povis montri, ke li bone atentis dum la vojaĝo kaj lernis multon.

„Mi vidas ridantan virinon, kiu rigardas al mi, kaj jen, kiel komike! Ŝi portas saman bluan robon kiel mi!”

„Ho, malsaĝa patrinjo, tio estas via propra vizaĝo,” diris la viro, fiera, ke li scias ion, kion la edzino ne scias. „Tiu ronda metala objekto estas spegulo; en la granda urbo ĉiu posedas ĝin, kvankam ni en tiu ĉi izolita vilaĝo eĉ neniam aŭdis pri tio.”

La edzino estis tre kontenta pri la donaco kaj en la postaj tagoj ŝi ne povis ĉesi rigardi la spegulon; ĉar prezentu al vi, ke estis la unua fojo en ŝia vivo, ke ŝi vidas spegulon. Sed tia grandvalora objekto estis tro bela por ĉiutaga uzo, tial ŝi metis la spegulon baldaŭ en la lignan kesteton kaj formetis ĝin ĉe siaj plej karaj trezoroj.

Jaroj forpasis kaj la geedzoj vivis ĉiam tre feliĉe. La ĝojo de ilia vivo estis la filineto, la vivanta portreto de sia patrino, kaj krome ĉarmeta, bona, kaj tiel kore afabla, ke ĉiu amis ŝin. Pensante pri la vanteco, kiu regis ŝin dum kelkaj tagoj, kiam la spegulo venis en ŝia posedo, la patrino zorge kaŝis ĝin, ĉar ŝi timis, ke la spegulo forigos la simplecon de ŝia amata infano kaj igos ŝin vanta kaj frivola. Do ŝi parolis neniam pri la spegulo, kaj la patro ĝin tute forgesis. Tiel okazis, ke la filino iĝis same senafekta kiel la patrino, kaj ne sciis pri sia ĉarmo, nek pri la ekzisto de objektoj, per kiuj eblas rigardi la propran vizaĝon.

Sed granda bato atendis ĉi tiun simplan, feliĉan familion. La patrino malsaniĝis kaj malgraŭ la fidelaj kaj amplenaj zorgoj de l'filino, tage kaj nokte, ŝia malsano pli kaj pli graviĝis, ĝis fine oni perdis ĉiun esperon pri ŝia saviĝo.

Sentante, ke ŝi mortos, la kompatinda virino estis tre ĉagrena. Sed ŝi elpensis ion, por bone influu la filinon eĉ ankoraŭ post sia morto. Ŝi vokis la knabinon al si kaj petis ŝin preni la lignan kesteton, en kiu kuŝas la spegulo. La knabino faris tion kaj la patrino diris: „Vi scias, knabinjo, ke via patrino ne plu longe estos ĉe vi. Tiam vi sentos la mankon de mia konsilo kaj gvido kaj tamen vi devos esti duoble forta, ĉar la patro sentos sin tre soleca kaj

forlasita kaj li serĉos konsolon kaj apogon ĉe vi. Tion vi donu al li, mia infano; kaj eĉ post mia morto mi penos iom helpi vin. Vidu, en tiu ĉi kesteto kuŝas objekto, kiun oni nomas „spegulo.” Tia spegulo posedas magian forton. Kiam vi rigardos en ĝin ĉiumatene kaj ĉiuvespere, tiam estos al vi, kvazaŭ vi vidas mian vizaĝon, kaj tiom longe, kiom vi sincere kuraĝos rigardi min en la okulojn, vi estos feliĉa. Ĉu vi promesas al mi, infano mia, ke tiel vi uzos la spegulon?”

La knabino donis la promeson plorante. Baldaŭ poste la patrino mortis trankvile. La knabino forgesis neniam, kion ŝi promesis. Ĉiumatene kaj ĉiuvespere ŝi prenis la spegulon kaj longe kaj serioze rigardis ĝin. Tiam ŝi vidis la karan ridetantan vizaĝon de l'patrino — ne pala kaj malgrasa, kiel en ŝiaj lastaj vivotagoj, sed tia, kia ŝi estis antaŭ la malsaniĝo.

Tiel ŝi vivis tagon post tago kvazaŭ sub la okuloj de l'patrino, ĉiam klopodante imiti ŝin. Ŝia plej granda ĝojo estis rigardi la spegulon kun la penso: „Patrino, hodiaŭ mi faris nur tion, kion vi aprobus.”

Ne komprenante kial la filino tiel regule rigardas la spegulon, la patro ekparolis iun tagon al ŝi pri tio.

„Patro,” ŝi diris, „mi rigardas ĉiun tagon en la spegulo por vidi panjon.” Tiam ŝi rakontis al li, kion ŝi promesis al la mortanta virino, kaj ke ŝi ankoraŭ neniam forgesis plenumi la promeson. Frapita de tia fidela amo, la patro ekploris pro kortuŝo. Li ne havis la kuraĝon rakonti al sia filino, ke tio, kion ŝi vidas en la spegulo, estas nenio alia ol ŝia propra ĉarma vizaĝo, kiu pli kaj pli similas al tiu de l'patrino.

trad. „VANE”.

### KIU ESTIS LA INSTRUISTINO?

La instruistino, kiu kutime instruis la infanojn pri botaniko, estis malsana. Ŝin anstataŭis juna fraŭlino, ne tre kapabla je tiu fako.

Iun tagon ŝi ekpromenis kun la gelernantoj, por instrui ilin pri arboj. Ŝi rakontis al la infanoj, kial la arboj havas radikojn, trunkon, branĉojn kaj foliojn. Poste ŝi diris la nomojn de la diversaj arboj: saliko, kverko, poplo, ulmo, fago, ktp.

La infanoj nur aŭskultis kaj silentis, kaj la instruistino rimarkis, ke io ne estas en ordo. Pro tio ŝi diris al iu knabino, kiu iris apud ŝi: „Nu, Janjo, ĉu vi vidas tiun belan fagon? Mi tre scivolas, kion tiu rakontus pri sia vivo, se ĝi kapablus paroli!”

„Mi pensas,” respondis Janjo, „ke ĝi dirus: „Pardonu min, fraŭlino, mi ne estas fago, mi estas ulmo!”

## KION FARAS LA PATRO, ĈIAM ESTAS BONA.

(Teatraĵo unuakta, laŭ fabelo de Andersen).

	Hans	Viro kun ŝafo.
Personoj:	Edzino de Hans	Viro kun ansero.
	Sinjoro	Viro kun kokino.
	Viro kun bovino	Viro kun sako da putraj pomoj.

(La scenejo prezentas vojon. La fundo prezentas: domon, arbojn, barilon, aŭ ĝardenon. Flanke de la vojo staras benko).

*Hans (aperas, tirante ludĉevalon):* Bles, bles, kiom malmulte vi fakte utilas al ni!

*Edzino de Hans (venas sur la scenejon):* Kion vi diras, Paĉjo?

*Hans:* Ĉu vi opinias, ke Bles multe utilas al ni?

*Edzino:* Ĝi estas nia nura posedaĵo!

*Hans:* Sed kiom da profito ĝi liveras al ni?

*Edzino:* La najbaro pli ofte veturas per ĝi, ol vi!

*Hans:* Ĝuste. Kaj nun mi pensis pri.....

*Edzino:* Pri kio vi pensis?

*Hanso:* Ni interŝanĝu ĝin por io, kio estas pli taŭga por ni!

*Edzino (fiere):* Jen, mia edzo ĉiam kaj ĉiam pravas! Kia li, ne ekzistas dua sur la mondo!

*Hanso:* Kaj por kio mi do interŝanĝu ĝin?

*Edzino:* Vi certe plej bone scias, paĉjo! Aŭskultu! Hodiaŭ estas foiro en la urbo! Iru tien kaj provu vendi la ĉevalon aŭ profite interŝanĝu ĝin! Iru do al la vendejo. Sed antaŭe mi ordigu vian kravaton. (*aranĝante la kravaton*): Jen, pri tio mi havas scion! Kaj mi ankaŭ purigu vian ĉapon (*brosas la ĉapon per la mano*): Jen..... kaj nun, bonan vojaĝon, paĉjo. Mi prizorgos la mastrumadon.

*Hans:* Kiom grandajn okulojn ĉi faros ĉe mia reveno! (*La edzino foriras; Hans mansalutas ŝin*).

*Hans (per ruĝa poŝtuko frotante la frunton):* Ho, ĉevaleto, kiom varme! Eĉ ne unu nubeto videbla! Ho mi iom ripozu (*eksidas sur la benkon*). Nenie ombreto. — Vidu, jen alvenas viro..... Kaj kion li tiras? Vere, estas bovino! (*Viro aperas sur la scenejon, tirante ludbovinon*).

*Hans:* Varme, hodiaŭ!

*Viro kun bovino:* Terure. Mi volas iom ripozi. Ne agrable, tiom longa vojo en tia varmo! (*eksidas apud Hans*).

*Hans:* Ĉu vi iras al la foiro?

*Viro:* Vi bone divenis!

*Hans:* Tiu besto certe donas multe da lakto!

*Viro:* Tion mi certigas al vi!

*Hans:* Bovino fakte donas pli da profito ol ĉevalo! Ĉiutage lakton!

*Viro:* Kaj el la lakto buteron kaj fromaĝon!

*Hans:* Efektive! Kion vi opinias..... ĉu ni interŝanĝu? Ĉevalo estas pli multekosta, sed bovino estas pli utila por mi.

*Viro*: Bonege! Tio ŝparas al mi la vojaĝon al la urbo. Jen, la besto!

*Hans*: Kaj jen mia! Vi spertu plezuron per ĝi!

*Viro*: Same. (*Ili interŝanĝas la bestojn. Viro kun ĉevalo for*).

*Hans*: (*ekstaras, streĉante la membrojn*): Nun mi povus eniri. Sed, ho, estas agrable ĉi tie. Kaj mi povas rigardi la preterirantojn. Ĉu, bovinjo, ni restos ankoraŭ iom. (*Ligas la bovinon al la benko*).

Kiu nun alproksimiĝas? Vere, estas viro kun ŝafo! (*Sur la scenejon venas viro kun ludŝafo*).

*Viro*: Bonan matenon!

*Hanso*: Same! Ĉu vi iras al la foiro?

*Viro*: Vi ĝuste divenis!

*Hans*: Bela ŝafo, amiko!

*Viro (kapjesas)*: Bela ŝafo.

*Hans*: Fortaj kruroj.

*Viro (kapjesas)*: Fortaj kruroj!

*Hans*: Kaj kiom da lano!

*Viro*: Multe da lano!

*Hans (parolante al si mem)*: Mi volonte posedus tian ŝafon! Flanke de la vojo kreskas sufiĉe da herbo, kaj dumvintre mi prenis ĝin en la ĉambrom. Ĉu ne estus pli saĝe havi ŝafon anstataŭ bovino? (*Al la viro*): Ni marĉandu, ĉu vi konsentus se mi interŝanĝus mian bovinon por via ŝafo?

*Viro*: Mi ne diras „ne”! Ni tuj interŝanĝu!

*Hans*: Bone! (*ili manpremas kaj la viro foriras kun la bovino*).

*Hans*: Ho, kiom varme estas! (*al la ŝafo*): Ankaŭ vi certe suferas, kun tia dika pelt! Kion mi nun ekvidas? (*fikse rigardas*): Estas viro kun ansero! (*Sur la scenejon venas viro kun ludansero*).

*Hans*: Kiom prospere aspektas tiu besto!

*Viro*: Tion mi kredas!

*Hans*: Tiu besto havas grason kaj plumojn! Kiom bele ĝi aspektas en mia lageto! Kaj panjo povus doni al ĝi ĉiajn forĵetaĵojn! Ŝi jam ofte diris: „Kiom feliĉa mi estus, se ni posedus anseron!” Nun mi povus kontentigi ŝian deziron! Diru, amiko, ĉu vi pretas interŝanĝi? Mi donos al vi la ŝafon, kaj vi donu al mi la anseron!

*Viro*: Ĉu senŝerce?

*Hans*: Komprenoble!

*Viro*: Sed, ĉu la ŝafo do estas sana?

*Hans*: Tiel sana, kiel vi kaj mi!

*Viro*: Nu, jen mia ansero!

*Hans*: Dankon! Vi faris al mi grandan plezuron! Feliĉon kun via ŝafo.

*Viro*: Kaj al vi feliĉon kun via ansero! (*Viro for kun ŝafo*).

*Hans (Ligante la beston per ŝnuro)*: Kiom kaprica estas ansero! Ĝi ĉiam tiras! Kaj mi deziras resti ankoraŭ iom. Jen, kio nun alvenas? Ha kokino! (*venas viro kun ludkokino*).

*Viro kun kokino*: Bela besteto, ĉu?

*Hans*: Tion mi konsentas! Estas la plej bela kokino, kiun mi iam ajn vidis! Pli bela ol la kluk-kokino de la pastro! Mi dezirus posedi ĝin!

*Viro:* Nu, aĉetu ĝin! Mi kontraŭvole vendas la beston, sed ĉar vi opinias ĝin tiom bela.....

*Hans:* Kokino povas zorgi pri si mem.

*Viro:* Efektive! Ĝi ja ĉiam trovas greneron! Nu, ĉu vi aĉetas mian kokinon?

*Hans:* Monon mi ne havas. Sed mi povas doni mian anseron interŝange por via kokino.

*Viro:* Fakte mia kokino valoras pli ol via ansero, sed..... jen! Ĉar vi estas vi. *(ili interŝanĝas la bestojn kaj la viro foriras kun la ansero).*

*Hans:* He, he, kiom mi jam komercis. Mi laciĝis. Ha, denove alproksimiĝas iu. Kion li portas? Ŝajnas peza sako! *(viro aperas, portante sakon surdorse).*

*Hans:* Kion vi portas en tiu sako?

*Viro:* Putrajn pomojn. Plensako, por la porkoj!

*Hans:* Multajn vi havas. Kiom panjo ĝojus, se ŝi vidus! Ĉijare ni rikoltis nur unu pomon de la pomarbo ĉe la torfejo. Tiun ŝi nepre volis rezervi, kaj ĝi kuŝis en la vestokesto tiom longe, ĝis fine la frukto tute sekiĝis. „Tamen estas signo de bonstato!” opiniis panjo. Sed nun mi povus montri al ŝi pruvon de bonstato! Kiom mi ĝojus!!

*Viro:* Ŝajnas, ke miaj putraj pomoj forte interesas vin! Nu, kiom vi donas por ili?

*Hans:* Kiom mi donos? Mian kokinon!

*Viro:* Bone, mi akceptas! *(li ĵetas la sakon antaŭ la piedojn de Hans, kaj foriras kun la kokino. De la alia flanko alproksimiĝas sinjoro. Li faletas pro la sako).*

*Hans:* Ho, ne estas mia kulpo!

*Sinjoro:* Kio estas en tiu sako?

*Hans:* Jes, tio estas longa historio! Fakte estas ĉevalo en la sako!

*Sinjoro:* Ĉu vi mokas min?

*Hans:* Tute ne! Ĉimatene mi posedis ĉevalon. La ĉevalon mi interŝanĝis por bovino, la bovinon por ŝafon, la ŝafon por ansero, la anseron por kokino kaj la kokinon por sako da putraj pomoj.

*Sinjoro:* Ha, ha, ha, nun vi certe ŝercas!

*Hans:* Serci? Mi neniam ŝercas! Estas la pura vero!

*Sinjoro:* Nu, ne atendos vin plezuro hejme! Via edzino certe ne bone regalos vin!

*Hans:* Atendos min kiso, ne plu! Mia panjo diros: „De l' paĉo farite, bone farite.

*Sinjoro:* Ne provu kredigi tion al mi! Nu, ĉu ni vetu ke via edzino malafable akceptos vin hejme? Mi estas riĉa! Mi volas veti kun vi je 10 sakoĵ da oro!

*Hans:* Ne je tiom! Unu sako sufiĉas, ĉar mi ja posedas nur unu sakon da putraj pomoj.

*Sinjoro:* Bone!

*Hans:* Kuniru! Ni alvokos mian edzinon, ŝi certe laboras malantaŭ la domo *(ili foriras dekstren; aliflanke de la scenejo aperas la edzino; ŝi metas la manon super la okulojn kaj fikse rigardas).*

*Edzino:* Paĉjo forrestas tre longe! Ho, kiom mi scivolas pri la interŝanĝo! Kion li kunportos hejmen? *(aŭskultas):* Jen, ĉu mi aŭdas lin? Certe,

estas li. Li portas grandan sakon sur ŝultro. Ĉu en tiu sako estas la surprizo? Kaj kiu akompanas lin? (*Hans kaj la sinjoro alproksimiĝas*).

*Hans*: Ha, panjo, ĉu vi estas ĉi tie? Ni jam serĉis vin en la ĝardeno! Bonan tagon!

*Edzino*: Bonan tagon, paĉjo!

*Hans*: Mi bone sukcesis en la interŝanĝo!

*Edzino*: Ho, tion mi jam antaŭsciis! (*Ŝi ĉirkaŭbrakas lin. Dum la sekvonta interparolo Hans aspektas pli kaj pli ĝoje, kaj la sinjoro pli kaj pli malĝoje*).

*Hans*: Aŭskultu! La ĉevalon mi interŝanĝis por bovino.

*Edzino*: Ha, ni do havos lakton! Kaj ni manĝos kaĉon, kaj ni havos buteron kaj fromaĝon! Estis bona interŝanĝo!

*Hans*: Certe, sed la bovinon mi interŝanĝis por ŝafo.

*Edzino*: Verdire pli bone! Ho, kiom saĝa vi do estas! Ni havas ĝuste sufiĉan herbon por ŝafo. Kaj ni ricevos ŝafo-lakton kaj fromaĝon, kaj lanajn ŝtrumpojn, eble eĉ lankovrilojn! Tion ne produktas bovino! Vi estas zorgema edzo!

*Hans*: Sed la ŝafon mi interŝanĝis por ansero.

*Edzino*: Ho, paĉjo, ĉijare ni je Kristnasko do manĝos anseron! Ho, kiom da plezuro vi faras al mi! Kiom afabla vi estas! Ni enfermos la beston, kaj je Kristnasko ĝi estos grasega!

*Hans*; Sed....., la anseron mi interŝanĝis por kokino.

*Edzino (frapante la manplatojn)*: Kokino! Kia bonega interŝanĝo! La kokino produktos ovojn, ĝi kovos ilin, kaj baldaŭ ni havos tutan kokidaron! Al tio mi ja ĉiam sopiris!

*Hans*: Jes, sed la kokinon mi interŝanĝis por sako da putraj pomoj.



*Edzino*: Nun mi devas kisi vin! Koran dankon, paĉjo! (*Ŝi ĉirkaŭbrakas lin*).

Nun mi volas rakonti ion al vi. Kiam vi forestis, mi deziris pretigi por vi bongustan ovo-manĝaĵon. Sed mi ne havis ovojn. Pro tio mi iris al la lernejestro. Ili havas kokinojn, mi sciis. Sed la edzino estas avara. Tial mi proponis interŝanĝi. „Interŝanĝi?” ŝi diris, en via ĝardeno kreskas nenio, eĉ ne unu putra pomo. Eĉ tion vi ne povus doni!” — Sed nun mi povus havigi al ŝi dek, eĉ plenan sakon! Ho paĉjo, bonege! De l' patro farite, bone farite (*ŝi kisas lin*).

*Sinjoro (iom proksimiĝas)*: Tio plaĉas al mi! Ĉiam malpli, kaj tamen kontenta! Tio valoras oron. Ĉar efektive oni bonvenigis vin ne per ri-proĉoj, sed per kiso! (*parolante al la publiko, malrapide kaj solene*): Karaĵ gesinjoroj. Vi, kiuj atente aŭskultis, povas lerni el ĉi tiu historio, ke ĉio, de l' patro farita, estas bone farita!!


Ni afable petas niajn abonantojn, kiuj abonis la gazeton ekde Januaro, pagi la abonkotizon por la jaro 1937.

## LA SOLVOJ EL No. 5.



La premiojn gajnis: S.ro G. Brown, Londono, Anglujo; S.ro Flossmann, Košice, Ĉeĥoslovakujo; F.ino Ménot, Orléans, Francujo.

## ENIGMOJ.



a, a, d, d, i, k, o, o, o,  
p, p, r, r, u, v, v.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. ciferon; 2. batilon; 3. prepozicion; 4. lokon, kie restas ŝipoj.

La tuto konsistas el 13 literoj kaj signifas agrablan tempopasigilon.

7.11.9.5.13 estas fiŝo.

2.1.10.6 estas parenco.

3.12.8 estas juna besto.

5.3.4.12.11.9.6 estas dolĉa nukso-speco.

Riga (Latv)

B. REICHBERG.

Lochem (Ned)

W. K. GOEDHEER.

Premion pro verkaĵo gajnis: F.ino B. Liberg. Amsterdamo, Ned.; S.ro Mitch, Manchester, Angl. S. Kool, West Grafftdijk.

## KION MI FARUS, SE MI ESTUS RIĈA.

(Verkaĵo laŭ unu el la temoj en „L.J.V.” No. 5 (Nov. '36).

Se mi estus riĉa, mi aĉetus aŭtomobilon. Unue mi veturus al Danlando, kie loĝas mia amiko Svend Erik Jørgens el Tanlov, sed li skribis en la lasta letero, ke li baldaŭ tranloĝiĝos al Huruji.

Kune kun li mi veturus al Francujo, al Abscari, al mia amikino Francoise Linne. Ankaŭ ŝin mi invitus kunvojaĝi.

Mi ne irus al Hispanujo, ĉar tie oni militas. De tie ni farus grandan vojaĝon al Japanujo, al Tokio, al du amikoj, Jyojiro Inaba kaj Jakahida Akimoto.

Kaj kvinope ni veturus tra la tuta mondo!..... Sed mi ne estas riĉa, do mi ne povas fari vojaĝon!

West-Graffdyk (Ned)

S. KOOL (15 jara knabo).

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.



## ĜOJU PRI L'VIVO (Ĉenkanto por 2 voĉoj.

① *forte* ②

1-C 6 5 4 | 3 ĥ 3 | 4 3 4 5 6 7 | ĥ 2 3 3 |

Ĝo - ju pri l'vi - vo, ĝo . . . . . ju, ĝo

. 2 2 | 2 ĥ ĥ | ĥ 7 7 | ĥ 5 3 0 :||

. . ju pri l'vi - vo, pri l'vi - vo, pri l'vi - vo.

Antverpeno. (Belg.) trad. J. VAN SCHOOR.

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

La grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo“:

La unuan jarkolekton en: Heilo, Oterleek, Driehuizen, St. Pancras.

La trian jarkolekton en: Aljustrel (Portugalujo); Berlin-Neukölln (Germ); Edware, Edinburgh (Brit.); Kouvola (Finl.); Hluk, Tešetice ĉe Olomouc (Ĉeh.); Riga (Latv.); Jesenice (Jugosl.); Ŝanhaj (Ĉin.); Le Havre (Franc.); Strasswalchen (Aŭstr.); Ljugarno (Sved.); Pisa (It.); Bergen, Deventer, Enkhuizen, Rotterdam, Gemert, Haarlem, Leeuwarden, Marssum, Huizum, Leerdam (Ned).

La internacian lernolibreton „L.J.V.“ oni enkondukis en: 2 infangrupojn en Amsterdam, Buitenpost, Rotterdam, Oudorp, Gemert, de Purmer, Groningen, den Helder, Krommenie, Heilo, Hilversum, Dordrecht (ĉiuj en Ned); Torskors (Sved); Kalundborg (Dan); Jesenice (Jugosl); Villeveyrac; So-main; Buxières d'Aillac (Franc).

### KORESPONDADO.

*M. en Dijon (Franc):* Ni ricevis de vi 673,50 fr. Koran dankon.

*Pifa — Hago (Ned):* Ni petas vian adreson. Resendi verkaĵojn ni nur povas fari post la ricevo de la bezonata afranko.

*J. C. — Riga (Latv):* La rakonto estas tro malfacila.

*S. P. — Liverpool (Angl):* Via manuskripto ne estas tute neŭtrala.

*J. M. — Alkmaar (Ned):* La poemo estas tro longa por „LJV“.

*Fr. — Groesbeek (Ned):* La manuskriptoj ne estas sufiĉe interesaj.

*H. — Warder (Ned):* Via lasta rakonto nur taŭgas por junaj infanoj.

*C. F. — Meadville (USA):* Via manuskripto estas tro longa por „LJV“.

*C. S. en Stabek (Norv)* sciigis al ni, ke Ole Bull (vidu p. 81, No. 6) ne estis Svedo, sed Norvego!

## Por komencantoj.

## AL JUNAJ ESPERANTISTOJ.

Infanoj karaj, nur kun vi  
 Sincere mi paroli povas.  
 En via klara okulpar'  
 Malsana kor' printempon  
 [trovas.

Amikoj junaj, nur al vi  
 La Estonteco apartenas.  
 Per manoj fortaj venkos v  
 La barojn, kiuj nin katena

Vin kronos mondo per radi'  
 De la kvinpinta verda stelo,  
 Vin, kavalira avangard',  
 Vin, militontoj por la Belo!

Riga (Latv)

LUDMILA JEVSEJEVA

## LIBERECO.

Maristo Vilhelmo longe suferis en malluma karcero. Li ne estis krimulo, sed en la milito la malamiko kaptis kaj malliberigis lin kune kun multaj aliaj malfeliĉuloj. Post la milito li liberiĝis. Tiu tagon li neniam forgesos. Komence la lumo blindigis lin, sed kiam liaj okuloj alkutimiĝis al ĝi, li senĉese rigardis ĉirkaŭ si. Precipe karesis lin la koloroj de la floroj, la arboj kaj la blua ĉielo. Li marŝis el la urbo en la kamparon. La alaŭdoj alten levis sin kaj ĝojkantis super la herbejo, tiom klare, kvazaŭ ili alte en la ĉielo sonorigis arĝentajn sonoriletojn. En la arboj pepis la movemaj paruoj kaj antaŭ li saltetis la grizaj paseroj. Ŝajnis, ke ĉiuj birdetoj ĝoj-kriis al li: „Libera, libera! Vi estas ree libera!” Larmoj aperis en liaj okuloj.

Pli poste li promenis sur la foiro kaj tie li ekvidis grandan kaĝon plena de paruoj kaj fringoj, time flugantaj kontraŭ la kradoj, kvazaŭ provante rompi ilin. Li pensis pri sia vivo en la malliberejo kaj pri la unua tago post sia liberiĝo, kiam la birdoj en la kampano salutis lin. Kiel senespere flugis la kaptitaj bestoj en la kaĝo kontraŭ la kradoj! Vilhelmo ne plu povis toleri tion. Ĵus li ricevis sian salajron, kaj li jam kalkulis, kion li aĉetos per sia trezoro. Li tamen ne longe hezitis, informiĝis ĉe la birdo-vendisto pri la prezo de la bestoj, malfermis la kaĝon kaj liberigis ĉiujn. Jen ili flugis trans la tegmentojn de la domoj, malaperante en la malproksimon.

renkonte al la vasta kamparo kaj altaj arboj. Ŝajnis al la maristo, ke li mem denove travivas la tagon de sia liberigo.

La vendisto montris per la fingro al sia frunto, ĉar li opiniis la mariston freneza.

„Se vi mem suferus dum kelkaj jaroj en malluma karceri, vi pli bone scius, kiom valoras libereco!” pensis Vilhelmo.

Wormer (Ned.).

K. STAM.

#### Tasko:

- I. Traduku en vian gepatran lingvon „Libereco”, kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- II. Lernu parkere „Al junaj Esperantistoj”, kaj deklamu ĝin dum la grupkunveno.
- III. Lernu parkere kaj traduku jenajn proverbojn: Oni lekas la manon, sed celas la panon. — Tro rapida akcelo ne kondukas al celo. — Kiu deziras ĉion, ofte akiras nenion. — Por ĉiu ago venos la tempo de pago. — Post sufero venas prospero.
- IV. Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: Kial mi estas Esperantisto? — Miaj libroj. — Mia lerneja tempo.

**Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni disdonos 2 premiojn. Ni atendas la verkaĵojn antaŭ 1 Marto.**

---

### LUDO (Vortĉeno).

Unu ludanto nomas kunmetitan vorton, ekz: „florpoto”. La dua ludanto daŭrigas per: „potkuleri”, la tria per: „kulerskatolo”, k.t.p.

Kiu ne povas daŭrigi, fariĝas „muta”. Kiam ĉiuj, escepte unu, estas mutaj, tiu „parolanto” reparoligas siajn malfeliĉajn kunulojn, nomante novan vorton. Oni notu la „ĉenerojn”, kaj klopodu fari ĉiam pli longajn.

Buinen (Ned.)

M. MEDEMA.

La eldono de „La Juna Vivo” ne estas komerc-entrepreno. La abonantoj pagas nur la kostojn de la papero, presado kaj afranko.

Ĉar la paperprezo plialtiĝis, la redakcio estis devigata fiksi la jaronon por Nederlando je 80 cendoj.

## LA DUDEK UNUA LECIONO.

A. Li legas libron de amiko.

Li legas **lian** libron.

Li legas libron de si mem.

Li legas **sian** libron.

Ŝi surhavas ĉapelon de amikino.

Ŝi surhavas **ŝian** ĉapelon.

Ŝi surhavas ĉapelon de si mem.

Ŝi surhavas **sian** ĉapelon.

Ili vidis la domon de mia patro.

Ili vidis **ilian** domon.

Ili vidis la domon de si mem.

Ili vidis **sian** domon.

B. **Inda**, vid-inda, leg-inda, aŭdinda, kompatinda, **ridinda**, be-  
daŭrinda, rimarkinda, aminda.

C. **Ebla**; legi — leg-**ebla**, vidi — videbla, manĝebla, **venkebla**,  
forgesebla, neevitebla, pagebla, **luebla**, komprenebla, **respektebla**,  
aŭdebla, akirebla, atingebla, nekredebla.

## D. Pri la maldiligenta paŝtisto.

Iam estis **paŝtisto**, kiu ne ŝatis lacigi sin. **Prefere** li ripozis en  
la ombro de la arboj. **Foje** li kuŝis sub sovaĝa pirarbo, tiu paŝtisto.  
Kaj lia tornistro, **plena de pano** kaj kolbaso kaj ŝinko, pendis sur



branĉo. Nu, kaj kiam li kuŝis tie dum kelka tempo, li subite ek-  
ploris. Kaj li daŭre ploris, tiu paŝtisto. Kaj finfine lia hundo pro  
**ĉagreno** kunploris. Kaj tiel sonis tra la **silento** dum longa tempo  
la plorado kaj la blekado de la paŝtisto kun sia hundo.

Tiam preterpasis homoj. Kaj kompreneble ili miris, ke la paŝtisto  
kun la hundo tiel ege ploras. „Aĥ, Aĥ,” ili diris komplate, kaj ili

**haltis** antaŭ la paŝtisto, „aĥ, aĥ, paŝtisto, kial do vi ploras?” „Ho, ve,” li respondis, kaj li plorgemis kiel infano, tiu paŝtisto. „Ho, ve, mi tiom ege malsatas!” „Aĥ, kompatindulo,” diris la homoj, kaj tuj ili malfermis siajn tornistrojn, kaj diris: „**Levu** vin kaj venu al ni, ni donos al vi ion por manĝi.” Sed la paŝtisto streĉis sin, oscedis kaj ankoraŭfoje oscedis kaj diris ĝemante kaj plendante: „Jes, sed se mi do ne povas resti kuŝanta, se mi devas levi min, mi same bone povas preni panon kaj kolbason el mia propra tornistro. Tie ĝi pendas ja super mi sur la arbo. Kaj ĝi estas ankoraŭ tute plena.....”

VANE.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtlegu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A, B, C, D en vian kajeron. d. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de D. e. Respondu al jenaj demandoj:

Kiu ne ŝatis lacigi sin? Kie li prefere ripozis? Kie li foje kuŝis? Kio estis en lia tornistro? Kio okazis post kelka tempo? Ĉu li longe ploris? Kiu kunploris? Kiuj preteriris? Pro kio ili miris? Ĉu ili haltis? Kion ili diris? Kiel ploris la paŝtisto? Kial li ploris? Ĉu la homoj komptis la viron? Kion ili diris? Kion faris la paŝtisto? Kion li diris?

### LA DUDEK DUA LECIONO.

A. Enirante li **salutis** la gastojn. Kiam (dum) li eniris, li salutis la gastojn.  
 Aŭdante tion, li ekkoleris. Kiam li aŭdis tion, li ekkoleris.  
 Legante la knabino **trikas**. Dum ŝi legas, la knabino trikas.

### B. PLI FACILE.

**Almozulo** venis al domo kaj petis ion por manĝi. La **dommastrino** respondis: „Mi donos al vi tagmanĝon, **kondiĉe** ke vi purigos la straton antaŭ mia domo.”

La viro konsentis, kaj **apetite** li formanĝis ĉion, kion li ricevis. Poste la sinjorino venis kun grandega balailo.

„Ho, sinjorino, mi tute ne bezonas tiun **aparaton**”, diris la almozulo, „mi neniam uzas balailon por purigi straton!”

„Ne balailon?” demandis la virino, „Kion vi do uzas? Ĉu ŝovelilon?”

„Ne, sinjorino,” respondis la viro, irante al la elirejo, „mia **metodo** estas preĝi por pluvo!”

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtlegu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A kaj B en vian kajeron. d. Lernu parkere B.

## KORESPONDADRESOJ.

**Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj.**

**Danujo:** S.ro Arne Tulstrup, Hinnedrup, Malling, 27 jara kokimbredisto, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

**Germanujo:** S.ro Joh. Freutsmiede, Oberbuch, Post Tyrlaching Obb., dez. korespondi.

**Finnlando:** Uno Vulli, Kiviniemi, as. Røykkylä, dez. kor. kun F.inoj, maŝinistoj, mekanistoj. Interŝ. P. M., monerojn, bildojn, il. gaz.

**Francujo:** 20 junaj geesperantistoj (12-16 j.) dez. kor. kun gejunuloj ĉu kolektive, ĉu individue. Certa resp. S.ro Jozelli, 3 Rue Bosquet, Fenain (N).

**Nederlando:** S.ino E. Kloker-Worp dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn kun gesamideanoj en ĉiu lando. Adr. Westerweg B 38, Purmer.

**Nederlando:** F.ino Gr. Meyer, Kerkbuurt 10, Purmer, dez. kor. kun gesamideanoj.

**Nederlando:** S.ro M. E. de Heer, Oosterweg 36, Purmer, dez. kor. kun ĉiu lando.

**Nederlando:** 22 jara junulo dez. kor. per let. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. M. Wydenes, Kerkebuurt 53, Opperdoes.

**Nederlando:** 26 jara fraŭlo dez. kor. per let. kaj il. poŝtk. kun ĉiuj landoj. Respondo certa. Adr: G. Maessen, Zandstr. 56, Montfoort (Limb.)

**Nederlando:** F.ino H. Huigen, 16 jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr: Jan Oldenburglaan 3A, Bergen (NH).

**Nederlando:** S.ro B. Luit, Winsum (Gr), dez. interŝ. poŝtmarkojn. Kiu sendas al li 25 ekz. ricevos saman kvanton.

**Nederlando:** 42 jara domkolorigisto dez. kor. kun geamikoj de la tuta mondo. Certe respondos. Adr: P. Keesman, St. Maartensbrug (C. 15).

**Danujo:** Esperanto Klubo „Libereco“, Bjeringbro, Danio, dez. kor. k.ĉ.l.

**Nederlando:** Matthys Breel, 17 jara skolto, dez. kor. kaj interŝanĝi fotojn, gaz., k.ĉ.l. Koudekerkseweg B242 j, Koudekerke (Z).

**Latvujo:** S.ino A. Arbergs dez. kor. kun eksterlandaj gesamideanoj. Adr: Ives iela 4—2, Riga.

**Danujo:** 18 jara knabo deziras korespondi kun nederlandaj geknaboj. Adr: Helmer Grönborg, A/M „Hornelund“ pr. Tistrup, Jutlando.

**Nederlando:** S.ro J. G. Schellaert dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Certe respondos. Adr: Krugerstr. 35, Utrecht.

**Portugalujo:** S.ro M. A. Rodrigues, Val d'Oca, Aljustrel, dez. kor.

**Portugalujo:** S.ro Joaquin Carapniha, Horlogisto, Aljustrel, dez. kor.

**Portugalujo:** S.ro Edm. Man. da Silva, Sindicato Agricola, Aljustrel, dez. korespondi.

**Portugalujo:** S.ro J. da Conceicad Ramos, Algares, Aljustrel, dez. kor.

**Nederlando:** S.ro J. v. Voorden, 23 jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr: Zuiderweg 228, Z. O. Beemster, Post-Purmerend.

**Francujo:** 25 knabinoj (10-15 jaraj dez. interŝ let. poŝt. il. kun ĉiuj landoj. F.ino Lepachelet, Somain (N.).

**Finnlando:** Esp. Vendredklubo dez. kor. kun eksterlandaj gesamideanoj, ankaŭ pli aĝaj. Instruisto Kivinen, Konvola.

## „JUNA VIVO” - VOJAĜO AL SVISUJO.

La plej efika kaj plej agrabla maniero propagandi Esperanton estas karavane vojaĝi al fremdaj landoj, precipe vojaĝi per aŭtobuso, ornamita per esperantaj flagoj kaj tukoj. Tia karavano altiras la atenton de la preterirantoj kaj efikas pli ol iu ajn alia propagandilo.

La komuna celo formas fortan ligan inter la vojaĝantoj, tiel ke ili jam ekde la komenco sentas sin unu granda familio. Ili babilas, ridas, diskutas, kantas Esperante, kaj farante ĉi ĉion, - propagandas.

Krome, alvenante en fremdaj urboj, ili renkontas samideanojn, kun kiuj ili pasigas agrablajn horojn.

Tian veturon certe ĉiu deziras fari. Sed la leganto verŝajne rimarkos: „Tio ne eblas al mi. Mi disponas pri nur malmulte da mono, kaj ĝi certe ne sufiĉas fari grandan vojaĝon!”

Nu, kara leganto, mi klarigu, kiel vi per modera sumo povas partopreni en tia festo. La redakcio intencas organizi jenan veturon: Per aŭtobusoj de Amsterdamo trans Luik, Verdun, Bazel al Lausanne. Kaj de Lausanne trans Dijon, Parizo, Bruselo al Amsterdamo. Ni mem preparos niajn buterpanojn, ni tagmanĝos en restoracio kaj tranoktos en la plej luksa hotelo, nome en la libera naturo, sub la vasta ĉielo. Por ŝirmi nin kontraŭ la malvarmo ni starigos tendojn.

Jen la detala plano: Foriro dimanĉon, la 25an de Julio.

Reveno, dimanĉon la 8an de Aŭgusto, entute do 15 tagojn.

Dimanĉon: Amsterdam—Aywaille.

Lundon: Promenado tra la montaro Ardenoj, vizito al Remouchamps.

Mardon: Aywaille—Verdun. Vizito al la batalkampoj tie.

Merkredon: Al du Busang, banloko en Vogezoj. (Vosges) Vasgoj.

Ĵaŭdon: Vagado tra la montaro.

Vendredon: Kelkhoran viziton al Bazel, plue al Solothurn, malnova urbeto en Svisujo.

Sabaton: Grimpado al Weizenstein, kie oni povas ĝui unu el la plej belaj panoramoj de tuta Svisujo.

Dimanĉon: Laŭlonge de la lago de Neuchatel al Lausanne.

Lundon: Libera promenado.

Mardon kaj merkredon: Veturo trans Dijon al Versailles.

Ĵaŭdon: Matene: vizito al la kastelo de Versailles; posttagmeze kaj vespere: Vizito al la mondekspozicio.

Vendredon: Veturo tra Parizo. Vizito al diversaj vidindaĵoj. Foriro el Parizo.

Sabaton: Al Bruselo.

Dimanĉon: Hejmvojaĝo.

Kaj kiom kostas tiu festo? Ĝi kostas 52 guldenojn, ĉio enkalkulita. (Por Angloj £ 5-16, Svedoj 109 kr., Danoj 129 kr.).

52 guldenoj por: sidloko en aŭtobuso, manĝoj kaj tendluo.

Kiu kunprenos propran tendon, ricevos rabaton: 2 guldenojn por ĉiu dormloko, kiun ĝi enhavas.

Propran pasporton vi plej verŝajne ne bezonas. Ni klopodos akiri kolektivian pasporton.

Kaj nun, legantoj: Anoncu vin baldaŭ. Ne plendu pri monmanko, sed ŝparu, ŝparu! Sendu ĉiumonate 5 aŭ 10 guldenojn al la red. de „La Juna Vivo” kaj zorgu, ke antaŭ la 15a de Julio ĉio estos pagita. Kiu retiros sin antaŭ la unua de Majo ricevos la tutan pagitan sumon. Oni povas retiri sin eĉ la tagon de la forvojaĝo. En tiu okazo oni perdas nur 10 guldenojn de la sendita mono.

Do: ne prokrastu vian anoncon, sed mendu baldaŭ sidlokon. Pripensu, ke la nombro da sidlokoj estas limigita.

La redakcio streĉe atendas!

Al eventualaj informpetantoj ni respondos en la venonta numero de la gazeto.

<p style="text-align: center;"><b>SKRIBA CORSO</b> por A. kaj B.</p> <p style="text-align: center;">(nur por holandlingvanoj).</p> <p>Tre detala B-kurso. Gvidanto</p> <p style="text-align: center;"><b>Simon Aarse.</b></p> <p>Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.</p> <p style="text-align: center;"><b>La Verda Stelo, Radioweg 45,</b> <b>Amsterdam-O.</b></p>	<p>Vi jam longe deziras interesan, amuzan kaj instruon gazeton? Jen ĝi:</p> <p style="text-align: center;"><b>VERDA REVUO</b></p> <p>Ĝi estas riĉe ilustrita, simple skribita kaj aperas ĉiumonate regule jam la trian jaron. Tutjara abono estas 1,5 guld. Postulu senkoston specimennon ĉe la abonejo por Ned.:</p> <p style="text-align: center;">„LA JUNA VIVO”, West-Graaftdijk.</p>
<p><b>KIAL</b></p> <p>vendigās tiom multaj binditaj jar-kolektoj de</p> <p style="text-align: center;"><b>„LA JUNA VIVO”?</b></p> <p>Ĉar tiuj libroj pro sia varia enhavo (por komencantoj kaj por progresintoj) fariĝas nepre bezonata studilo en ĉiuj kurs- kaj grupvesperoj!</p> <p><i>Prezo:</i> 1,6 sv.fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.</p>	<p style="text-align: center;"><b>JEN LA SOLVO!</b></p> <p>Vi ne kuraĝas starigi esp. kursojn, ĉar vi ne estas sperta instruisto? Ne timu, per la simpla metodo en la „Internacia Lernolibreto”</p> <p style="text-align: center;">„LA JUNA VIVO”</p> <p>vi povas instrui!</p> <p>La tre malalta prezo kaj la varia enhavo certe allogos multajn kursanojn! Petu specimennon!!! (0,20 gld. aŭ 2 resp. kup.).</p>
<p style="text-align: center;"><b>La „INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO”.</b></p> <p style="text-align: center;">(oficiala organo de T.A.G.E.)</p> <p>Jam eniris la 15an jaron de sia ekzistado.</p> <p>Tio ja atestas, ke I.P.R. rajte ludas sian rolon en la esperanta gazetaro. Petu <i>tuj</i> senpagan specimennon de la adm: P. KORTE, VEENDAM (Ned.)</p>	<p style="text-align: center;"><b>JARKOTIZO:</b></p> <p><b>Ameriko:</b> 0,70 dol.; <b>Aŭstrio:</b> 3,20 ŝil. <b>Britujo:</b> 3 ŝil.; <b>Belgujo:</b> 17 fr. fr.; <b>Bulgarujo:</b> 50 lev.; <b>Ĉeĥoslovakujo:</b> 16,50 Kĉs.; <b>Danujo:</b> 3 kr.; <b>Estonio:</b> 2,50 est. kr.; <b>Finnlando:</b> 30 finn. mk.; <b>Francujo:</b> 11 fr. fr.; <b>Germanujo:</b> 2 M.; <b>Hispanujo:</b> 5 pes.; <b>Italujo:</b> 8,3 ital. lir.; <b>Japanujo:</b> 2,50 jap. jen.; <b>Jugoslavio:</b> 30 din.; <b>Latvio:</b> 2,1 l.; <b>Norvegujo:</b> 2,7 kr.; <b>Polujo:</b> 3,6 zl.; <b>Portugalujo:</b> 15 port. esk.; <b>Svedujo:</b> 2,70 kr.</p>